PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Pilo-Press
deziras
bonan, sukces-
plenan
NOVAN JARON !
**************

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 1/1976 - 2 jan 1976
Aperas ĉiusemajne

## Novjara mesaĝo 1976 de Prezidanto de UEA

Kiam la nuna Estraro de UEA elektiĝis en aŭgusto 1974, inkluzivita inter ĝiaj anoj estis tre respektata kaj ŝatata figuro de la Esperanto-movado, prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio, d-ro Pol Denoël. Laŭ profesio li estas kuracisto. Jen, ni diris, kuracisto kies ĉefa laboro por UEA estos reunuigi kaj refortigi nian Asocion. Kaj ĝuste tiun taskon ni konfidis al li. Ke d-ro Denoël sukcesis en tiu tasko, atestis interalie la bona kaj laborplena etoso de la 60-a Universala Kongreso en Kopenhago. Ĝin atestas ankaŭ la entuziasmo kaj saĝeco per kiuj nuntempe laboras multaj el niaj landaj kaj fakaj asocioj, kaj la novaj iniciatoj kiuj okazas tra diversaj sektoroj de la Asocio.

Kvankam la prezidanto mem ne estas la plej senpartia juĝanto, ŝajnas, ke la Universala Kongreso estis ĉi-jare escepte fruktodona. La Komitato de UEA reformis siajn internajn labormetodojn, fortigante siajn diversajn komisionojn kaj akceptante novajn procedurajn regulojn; ĝi decidis pri pluraj novaj paŝoj sur la kampoj de administrado (interalie renovigo de la kotiza sistemo) kaj de eksteraj rilatoj; ĝi rekonfirmis la politikan neŭtralecon de la Asocio; ĝi fiksis la estontan vojon de la Centro de Esploro kaj Dokumentado; ĝi sendis rezolucion al la Eŭropa Sekureca Konferenco; kaj, eble plej grave, ĝi aŭdis pri la restabiliĝo de la financoj de la Asocio kaj principe akceptis novan kaj ambician programon por financa plifortigo. Ĉi-lasta, kiu nomiĝos la Financa Programo de la Esperanto-Movado, tuŝos ne nur UEA sed ĉiujn asociojn kiuj rilatas kun ĝi. Ĝia ĉefa celo estas allogi per kunordigita kaj sistema agado financajn kontribuojn el ekster la rondoj de la Esperanto-movado.

La kongreso ankaŭ spertis plifortiĝon de la rilatoj inter fakaj kaj inter landaj asocioj, ĝiaj kunsidoj pri la Internacia Jaro de la Virino notinde sukcesis, bona teatra prezento kaj impona kunsido de la Belartaj Konkursoj faris sian kontribuon, kaj pluraj novaj eroj aŭ formoj en programo estis klare sukcesaj. Ankaŭ la kongreso (pere de la Komitato) rekonis justan kaj dignan rilaton al la historio mem de nia Afero, nomante sep veteranojn de la Esperanto-movado Honoraj Membroj de UEA.

Verŝajne d-ro Denoël hodiaŭ diagnozus, ke la Asocio estas sur bona vojo al kompleta saniĝo. Sed restas la demando ĉu tiu resaniĝo fariĝos daŭra, firma kaj konstanta. Kaj kiel transformi la foje durajn lecionojn de la pasinteco en la sukcesojn de morgaŭ? Ni havas certan senton pri ni mem, heredaĵon de multaj jaroj da laboro por Esperanto, kiu enhavas multajn bonajn ecojn sed eble bezonas modifon. Ni emas supozi, ke la fortoj de la Esperanto-movado estas tre limigitaj. En certaj sencoj tiu supozo estas komprenebIe tute prava: niaj rimedoj ne estas senlimaj kaj ni ne povas ĉion. Sed en aliaj sencoj ĝi estas profunde erara. Kultura movado kiel la nia, kiu kalkulas inter si centmilojn da aktivuloj kaj simpatianoj, malantaŭ kiu staras longa, klera kaj impona historio, havas fortojn kaj potencialojn grandegajn. La sukceso de Esperanto venos kiam ni trovos

la vojon al plena utiligo de ĉiuj tiuj fortoj je nia dispono, kiam ĉiu homo kontribuos libervole kaj ĝis maksimumo, kaj kiam ni igos nian historion labori por nia estonteco.

Tiu maksimuma strebo por nia idealo - la idealo de komuna internacia lingvo por ĉiuj homoj - kuŝas interne de niaj kapabloj, sed ni ankoraŭ ne plene realigas ĝin. Persone mi opinias, ke ĝi estos realigebla ne per devigo, ne per internaj kvereloj pri neesencaj demandoj, sed per toleremo, komprenemo, reciproka respekto, kaj (ĉefe) sinceraj klopodoj trovi komunan grundon kaj difini klare niajn prioritatojn. Tiu estis la vojo de Zamenhof, eĉ se la historio foje alportis siajn renversojn. Tiu estu la vojo de ni, posteuloj de Zamenhof en pli skeptika sed nepre pli saĝa mondo.

La spirito de Kopenhago jam montris, ke la vojo de komprenemo kondukas al konkretaj kaj pozitivaj rezultoj. Interalie ĝi permesas al ni koncentri niajn fortojn je la ĉefa tasko. Surbaze de tiu spirito venis nova esprimiĝo, flanke de niaj membroj, de konfido kaj laborpreteco. Tio speguliĝas en la bona reago al la nova Volontula Servo, en la konto Donacoj (kiu atingis rekordan nivelon en 1975), en la Societo Zamenhof, en la Financa Programo, en la laboro de la landaj asocioj. Nun necesas ĝuste etendi niajn limojn: kapti la atenton kaj simpation de la publiko, gajni la subtenon de instancoj kaj organizoj, instrui la lingvon, saĝe informadi pri ĝi, evoluigi kaj pristudi nian movadon kaj nian medion. Gravaj taskoj - sed indaj kaj realigeblaj taskoj.

Kio validas por UEA mem kompreneble validas por ĉiuj flankoj de nia vasta kaj vivoplena movado. UEA ne laboras en vakuo, ne laboras en izolo. La laboro de la diversaj fakaj asocioj, la laboro de la neneŭtralaj organizoj, la eldona agado, la radio, la diligenta aktivado de amaso da instruistoj kaj lokaj organizantoj - ĉio ĉi ankaŭ floros en atmosfero de toleremo kaj celkonscio. Kaj kun ĉiuj flankoj de nia movado UEA deziras kunlabori por la komuna bono. Sur la sojlo de 1976, la Estraro de UEA kaj ĉiuj labororganoj de la Asocio salutas ne nur la membrojn de la Asocio sed ĉiujn parolantojn de la Internacia Lingvo.

Por la jaro 1976 UEA havas ambiciajn planojn, inter kiuj la 61-a Universala Kongreso en Ateno estos nur la plej festa kaj plej krona elemento. Ni invitas al la tuta esperantistaro partopreni nian agadon, plene ĝui la propran esperantistecon, kaj serioze entrepreni tiun nian kulturan respondecon disvastigi kaj evoluigi nian lingvon.

La jaro 1976 alportu sukceson, pacon, prosperon, kaj - sanon - al ni ĉiuj!

Humphrey Tonkin
Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

*********************

## SAT-Kongreso 1976 en Gotenburgo

Gotenburgo (OKK/pp) - Multaj esperantistoj ankoraŭ memoras la 8-an Kongreson de SAT, okazinta en 1928 en Gotenburgo. Grava aldono al la statuto de SAT estas "Konvencio de Gotenburgo", kiu datiĝas de la 8-a kongreso.

Nun okazos la 49-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda denove en la konata sveda havenurbo en la lasta semajno de julio 1976, pli precize de la 24 - 30 de julio. Kongresejon disponigos la Universitato de Gotenburgo en la bonsituanta domo de antaŭa Komerca Altlernejo, depost kvin jaroj integra parto de la Universitato por la fakultatoj de Jura Scienco kaj Industria Ekonomio. La kongresejo situas apud la bela alea strato Vasagatan 3.

Zamenhof-Festo en Paderborn

Paderborn (hb/pp) - 130 personoj partoprenis la grandan Zamenhof-feston de la Eŭropa-Klubo la 20-an de decembro 1975 en Paderborn, FRG. La prezidanto de la Eŭropa-Klubo, Hermann Behrmann, povis saluti gastojn de proksime kaj malproksime; ĉiuj venis, por foje vidi, kio okazas en Paderborn rilate la planlingvan instruadon. La gastoj venis el Nederlando, Britio, Francio, Jugoslavio, sed ankaŭ el Paderborn kaj la apudaj urbetoj.

La urbo estis reprezentita pere de urba direktoro Dr. Bernward Löwenberg. Por la German-Angla Klubo parolis s-ino Agethen, por UEA ties trezoristo, s-ro Woessink. La festparoladon faris profesoro d-ro Helmar Frank, kiu ĵus elektiĝis kiel kandidato por la aŭtunaj balotoj por la germana parlamento Bundestag. Estis lia unua parolado post lia elektiĝo.

En sia festparolado Profesoro Frank akcentis, ke la infanoj lernis lingvon, kiun hejme kutime neniu alia parolas. Tio konsiderinde levas ĉefe ĉe pli junaj infanoj la memkonscion. Li kuraĝigis la infanojn daŭrigi, ĉar la bazaj scioj poste multe helpos lerni pliajn lingvojn. Korespondamikojn oni facilege povas trovi. Li invitis kaj la multajn gepatrojn kaj la infanojn partopreni en la Someraj Universitataj Semajnoj, kiujn okazigos la Eŭropa Klubo de la 16-a ĝis 30-a de julio 1976 en Primoŝten.

Dum la kafo-paŭzo la ĉeestantoj rigardis la Esperantolibro-ekspozicion. Kaj multaj trovis ĉi tie en lasta minuto ankoraŭ donacon por la infanoj. Kelkaj gelernantoj legis mem verkitajn eseetojn kaj poemojn. Christopher Rausch invitis siajn kungelernantojn fondi "Eŭropan Infanan Klubon", kiu interŝanĝu kun eksterlandaj infanoj poŝtmarkojn, bildkartojn kaj tiel plu. La Esperanto-junularo invitis la gelernantojn al semajnfina libertempado en apuda kastelo. Pli ol 30 sinanoncoj tuj alvenis. Drago Smolić ricevis specialan aplaŭdon por siaj multaj film- kaj fotolaboroj en la kadro de la Eŭropa Klubo. Li montris filmon pri la infanfesto kaj diapozitivan serion pri la laboro de la klubo en Paderborn. La kanto "Esperanto estas la lingvo por ni" kun la nova dua strofo kun la linio "la brunaj amikoj de ni" estis la fino de tiu ĉi plensukcesa aranĝo.

Esperanto-Kursoj en Italio

Romo (ra-ro/pp) - Laŭ informo de la Itala Instituto de Esperanto, dum la pasinta lerneja jaro 1974-1975 la internacia lingvo estis instruita, en Italujo, en almenaŭ 101 kursoj, okazintaj en 41 urboj; kompletigis la kurson almenaŭ 1200 homoj.

Kelkaj el la okazintaj kursoj enkadriĝis en oficiala lerneja programo: en la elementa lernejo "Dante Alighieri" de Oltresavio (Cesena) studis Esperanton 380 geknaboj, en la kadro de la aldonaj lernofakoj kaj kun instruistino (d-rino Gianfranca Taddei) pagita de la ŝtato nur por instrui Esperanton; en Arzano apud Napolo la Esperantokurso estis klasifita "eksterkariera", kaj aldonita al la devigaj fakoj; en Città di Castello apud Peruĝo la kurso estis rajtigita de la lernejestro, kaj kun granda bedaŭro oni devis selekti 90 lernantojn el la 150, kiuj petis al si instruadon de Esperanto (pro manko de sufiĉaj instruistoj, en ĉi tiu urbeto oni devis instrui Esperanton en 4 vicoj!); en Vicoforte apud Cuneo, la kurso estis rajtigita de la lernejestro kaj de la gepatra konsilantaro; en Padovo la kurso apartenas al la oficialaj elekteblaj fakoj en eksperimenta jarduo de scienca liceo, kun regule pagata instruisto.

Pilo-Press - jarabono 30 GM (kun germana elsono 40 GM). Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, PostScheckkonto Nürnberg 819 56-851

## Esperanto en la radio

### Gratulon al prof. d-ro Antonio De Salvo

La redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma, prof. d-ro Antonio De Salvo, ĵus gajnis nacian konkurson por iĝi Referento ĉe la Konto-Kortumo, nome ĉe la Supera Tribunalo, kiu kompetentas pri demandoj ligitaj kun publikaj spezoj kaj respondeco de publikaj oficuloj. En la menciita konkurso, prof. d-ro De Salvo akiris la unuan postenon, per severaj ekzamenoj pri 16 diversaj fakoj (juraj, ekonomikaj kaj lingvaj). Apenaŭ 33-jara, prof. d-ro De Salvo estos unu el la plej junaj membroj de menciita Supera Tribunalo.

La ĝojo pro ĉi tiu atingo estas , tamen, iom vualita de la probablo, ke dum almenaŭ unu jaro prof. d-ro De Salvo devos translokiĝi de Romo al alia urbo; se tio efektive okazos, li devos dumtempe forlasi la redaktadon de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma, aŭ - minimume - eĉ daŭrigante la redaktadon, li ne plu povos registri la elsendojn. La situacion oni ekkonos, verŝajne, fine de januaro 1976-a.

### Radio Varsovio - kun fido antaŭen al la estonto

Dum la pasinta Esperanto-Ekspreso Radio Varsovio prezentis mallongan retro-rigardon al jaro 1975, kiun ni ĉi-sekve publikigas:

"Ni tre kore salutas ĉiujn geaŭskultantojn kie ajn atingas ilin nia voĉo.

Kiam oni komencas veturadon, la lastan en la nuna jaro, en la vagonaro, kiun ni nomas "Esperanto-Ekspreso", al la celatinga verda stacio, laŭnature oni emas rigardi malantaŭen al la trapasita vojo. Malantaŭ ni la tuta 1975-a jaro, la rolanta kaj abunda je Esperanto-eventoj fare de ni en la lando kiel ankaŭ en supera por ni lando kiun ni kutimas nomi Esperantujo. Kiel aprezi la tutan trapasitan vojon?

Same la sobra analizita prijuĝo kiel ankaŭ la emocia ekrigardo ordonas al ni kun satisfakcio retrorigardi, kun fido rigardi antaŭen al la estonto. Ŝajnas ke multaj donitaĵoj atestas pri ekvivado aŭ rekte pri renesanco de la esperantistaj movado kaj ideoj, en la mondo kaj ankaŭ en Pollando, do en nia lando kiu estas la patrujo de Ludoviko Zamenhof.....ĝuste la lasta Universala Kongreso de Esperanto, turnopunkta kongreso en Kopenhago, la grandega, plej granda ĝis nun alfluo de leteroj al nia redakcio kaj kredeble ankaŭ al aliaj radiofonioj emisiantaj en Esperanto, ordonas al ni juĝi ke ni troviĝas sur novaj esperantistaj evoluvojoj.

Jen tiom da mallongaj reflecioj esperantistaj antaŭ ol eniri la vagonaron kun la nomo Esperanto-Ekspreso, farante jam la lastan en la nuna jaro veturon....."

### 40 jarojn Svisa Kurtonda Servo

En 1975 Svisa Kurtonda Servo festis la 40-an datrevenon de sia ekzisto. Kaj fakte dum 29 jaroj funkcias la Esperanto-elsendoj de la Svisa Kurtonda Servo, konstatis d-ro Arthur Baur en sia lasta parolado ĉi-jara, lunde la 28-an de decembro. Li mem funkcias kiel parolisto de tiuj Esperanto-elsendoj dum 28 jaroj, certe rekordo en Esperanto-radiofonio. La nova Esperantlingva programfolio enhavas la fotojn de la du parolistoj kaj ties edzinoj, kiuj ankaŭ parolas sur la svisaj Esperanto-ondoj. En antaŭparolo la direktoro de la Svisa Kurtonda Servo diris, ke la aŭskultantoj havos tian elsendon kian ili deziras. Kaj tio fakte rilatas speciale al la Esperanto-elsendoj, komentis d-ro Baur. Sen reagoj de aŭskultantoj Esperanto-elsendoj ne estos!

*****************

Aŭskultu kaj skribu ankaŭ dum 1976 al la radio-stacioj,
kiuj emisias en Esperanto! Skribu tuj vian unuan karton!